Nia Ponto

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
☎: 94-416 44 92
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

E-kursoj: Lunde kaj Merkrede
Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
Nia bank-konto: BBK 22-1800155-0

septembro-oktobro 1998


ESPERANTO-KURSO

Como cada año, en Octubre comienza un nuevo curso de esperanto; se impartirá en nuestra sede durante 4 meses, los lunes y miércoles de cada semana, de 8 a 9 de la noche.

Toda ayuda para darlos a conocer es bienvenida; por ejemplo, colocando nuestros carteles en universidades, escuelas superiores, institutos, bibliotecas, casas de cultura, bares, tiendas, etc.

EN LA UNIVERSALA KONGRESO

3133 personoj el 66 landoj partoprenis la ĉi-jaran 83-an Universalan Kongreson de Esperanto (Montpelier, Francio), aŭguste. El ili 12 eŭskaj esperantistoj (sur la foto), 3 el Alabo kaj 9 el Biskajo (ĉi-lastaj ĉiuj membroj de nia asocio). Dum 8 tagoj ili povis ĝui la kutimajn programerojn: prelegoj, artaj prezentoj, kunvenoj de fakaj asocioj, ekskursoj, ktp.; krom, evidente, pluki el la bone provizita kongresa libroservo.



Sur la foto (ene de la kongresejo), de maldekstre kaj stare: Cristina kaj sia filo Mikel, "Chopo", Fernando, Xabi kaj Teo (nevidebla post li estas Rafa!); kaŭre: Alberto (sekretario de nia asocio), Jesús (patro de Mikel kaj nia kasisto), Andi kaj David.

Ne sur la foto, sed ankaŭ ĉeestis la Kongreson Sabin.

Fotis Regina Kaplan, pola samideanino kaj amikino de Alberto.

KRISTNASKA LOTERIO- LOTERÍA DE NAVIDAD

A partir del **Viernes 16 de Octubre**, comenzará la venta de participaciones de la lotería de Navidad. El número jugado este año por el Grupo es el **29354**, comprado en la "Lotería Bidebarrieta", de la calle del mismo nombre, en el Casco Viejo de Bilbao.

Como en años anteriores, cada participación se venderá al precio de 300 ptas., permitiendo jugar 250 ptas. de lotería y contando con el atractivo de estar totalmente impresas en esperanto.

Y también como en años anteriores, hacemos un llamamiento, a todos los socios y simpatizantes, para que nos ayuden en la venta de los boletos, ya que, con ello, están ayudando al mantenimiento de nuestra Asociación.

Por último, se ruega que, para cualquier tema relacionado con la lotería, se acuda al Grupo **preferentemente** (no necesariamente), los **Viernes, de 19 a 21 horas**. Gracias.

REDONO DE OBLIGACIOJ

Du jaroj pli frue ol planite, kaj laŭ decido de la lasta Ĝenerala Asembleo, nia Asocio sukcesis komplete redoni la restantan 60 % el la mono (ĉ. 900.000 ptoj.) al ni pruntedonita -per aĉeto de Obligacioj- antaŭ tri jaroj de kelkdekaj malavaraj asocianoj, por ebligi al ni pagi gravajn kaj multekostajn riparojn en la domo kie sidejas nia Asocio de antaŭ pli ol 30 jaroj. DANKEGON AL VI ĈIUJ!

Nun, kiel kutime, nia Asocio restas senmona, sed almenaŭ jam senŝulda.

NEKROLOGO

La pasintan 29-an de Junio mortis en Basauri, 78-jara, la membro de nia Asocio **DANIEL SAMPEDRO.**

Profesie fotisto, li estis asociano ekde 1987. Kvankam nesufiĉe regante la internacian lingvon, li regule ĉeestis la Universalajn Kongresojn de Esperanto (ofte kune kun nia karmemora Juan Luceranzu). Ĉi-jare, ekzemple, li ankoraŭ aliĝis al UK-o de Montpelier, sed intertempe li bedaŭrinde forpasis.

KE LI PACE RIPOZU!

"NUN"-LA PLEJ RAPIDA INFORMILO

Sveda Esperanto-Federacio funkciigis je la adreso **http://www.esperanto.se/nun** la elektronikan bultenon **NUN**, kiu celas esti "la plej rapida informilo de la esperanto-movado". La informoj pri kio okazis-okazas-okazos estas aldonataj aŭtomate al **NUN** kaj legeblas tuj post la aldono.

Verkanto povas esti ĉiu esperantisto kun aliro al la interreto. La aldono al **NUN** okazas per plenigo de speciala formularo trovebla je la sama retadreso. Ne estas bezonata kodvorto por rajti aldoni informojn. La prizorganto Franko Luin tamen certigas, ke aldonoj, kiuj ne estas informaj, estos rapide forigitaj el la enhavolisto.

Aldone al la aŭtomata aperigo de la artikoloj estas aranĝite, ke la tekstoj kun t.n. x-kodigo (t.e. ĉ skribita kiel c+x) aperas kun supersignoj al tiuj, kiuj retumas per Netscape Navigator 4 aŭ havas la tiparon E-Verdana instalita en sia komputilo.

Retumantoj, kiuj ne povas aliri kadro-bazitajn TTT-ejojn, povas legi la informojn en **NUN** per la adreso **http://www.esperanto.se/nun/enhavo.html**.

INTERRETE

http://www.esperanto.se/nun/

NUN — AKTUALAJ INFORMOJ PRI ESPERANTO

- 5-a Internacia ILEI-Gimnazio
  Geza KURUCZ, la 11-an de marto 1998
- Kunlaboro inter du radiostacioj kun disaŭdigoj en Esperanto
  Wim Posthuma, la 6-an de marto 1998
- La redakcio de Jura Amiko ĝojas
  Geza KURUCZ, la 05-an de mart 1998
- Paska Renkontiĝo 1998 de NEJ kaj FLEJA en Nederlando
  Fabien van Mook, sekretario de NEJ, la [illegible]
- Populara skribovando
  Franko Luin, la 4-an de marto 1998
- Gratulojn!
  Laszlo Szilvasi, la 03-an de marto 199[illegible]
- Stokholmo jubileas: 100-jara en a[illegible]
  Franko Luin, la 3-an de marto 1998
- Informo pri gazetoj ankaŭ en espe[illegible]
  Franko Luin, la 3-an de marto 1998
- NUN: la plej rapida informilo
  Franko Luin, la 3-an de marto 1998

NUN

AKTUALAJ INFORMOJ PRI ESPERANTO

NUN celas esti la plej rapida informilo de la esperanto-movado. Ĝi aperigas informojn, kiujn la esperantistoj verkis mem; ili aperas ekzakte tiel, kiel la verkintoj formulis ilin, neredaktitaj. Ili estas legeblaj de ĉiuj kun interreta ligo jam sekundojn post la sendo.

La unuaj artikoloj en la enhavolisto estas plej laste ricevitaj. Skribu mem, tuj kiam vi havas ion raportindan, kaj skribu regule - sed precipe skribu sen prokrasto!

Netscape: NUN - aktualaj informoj pri esperanto

Back | Forward | Home | Reload | Images | Open | Print | Find | Stop

Location: http://www.esperanto.se/nun/

What's New? | What's Cool? | Destinations | Net Search | People | Software

KIO ESTAS NUN?

SENDU INFORMON

ENHAVOLISTO

393034

VIZITOJ AL SEF

Per [illegible] kaj [illegible] superstrukturoj zorgo

Gazetara rifuto

Virtuala [illegible]

NUN

AKTUALAJ INFORMOJ PRI ESPERANTO

KRUCENIGMA KONKURSO

Interredaktore:

****

INTERRETA KRUCENIGMA KONKURSO

Jam estas multjara tradicio, ke la gazeto Esperantisto Slovaka regalas siajn legantojn per originalaj krucenigmoj en Esperanto. La A4-formataj krucenigmoj enhavas kaŝitajn Esperantajn proverbojn au anekdotojn kaj inter la solvintoj oni regule lotumas libropremiojn.

Krucenigmo el la lasta numero estas nun trovebla interrete:

http://www.esperantisto.sk/krucenig.htm

kaj la libropremiojn povas gajni ankau la retaj vizitantoj de la ES-hejmpago. La redaktoro petas la kolegojn aperigi la informon en aliaj E-gazetoj kaj donas la permeson libere reaperigi la krucenigmon kun indiko de la fonto: Esperantisto Slovaka, http://www.esperantisto.sk

Piaj informoj riceveblaj ĉe: redakcio@esperantisto.sk

Stano Marcek

Kiun aboni?

La plej legata revuo en Esperantujo. **ESPERANTO** estas la monata oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi entenas raportojn pri okazintaĵoj, artikolojn pri la movado kaj rilataj temoj, recenzojn, liston de lasttempe surmerkatigitaj libroj, kaj utilajn informojn por movadaj aktivuloj.

JARABONO: 3.600 ptoj.





KONTAKTO enhavas artikolojn pri ĝeneralaj temoj, kaj direktiĝas precipe al gejunuloj kaj al novaj uzantoj de la lingvo -tiel ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo-. Bela kaj moderna prezento. Enhavo ĉiam diversa kaj amuza. Dumonata.

JARABONO: 2.200 ptoj.

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo. "Pri ĉio ekster la Esperanto-Movado" diras siaj reklamanoncoj, kaj ne malprave, ĉar certe vi trovos en ĝiaj paĝoj vastan temogamon kaj ne malofte modelan lingvaĵon. Ĝin prilaboras 100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; publikigas nur originale en Esperanto verkitajn artikolojn. Monata.

JARABONO: 5.000 ptoj.





RETPOŜTA ESPERANTO-NOVAĴSERVO!

Ŝparu per interreto grandajn sumojn de presejaj kaj sendokostoj!
Estu ankaŭ vi informita! Movadaj informoj, interesaĵoj, "interredaktore" ktp.
http://www.hungary.net/esperanto/ aŭ petu informon: eventoj@hungary.net

...KAJ PER INTERRETO (INTERNET)